

Fenikso

Revuo de Esperanto Nederland

27-a jarkolekto • n-ro 5 | septembro - oktobro 2022



Impresoj pri la
Kultura Tago

Jurgen van den Berg van Villa VdB in
gesprek met Marc van Oostendorp

Anonco pri la
studsemajnfino en oktobro



Kunvenoj en
Nord-Nederlando 15

Federico Gobbo
4 gajnis du premiojn

Protokolo de la 31-a
12 ĝenerala kunveno

Poezio kaj prozo de
14 Joost Franssen



Jorien Captein
16 is trots op ouders

Fenikso, Forumo de Esperanto Nederland

Dumonata membrogazeto de Esperanto Nederland
ISSN 1384-6515

Membroj de Esperanto Nederland ricevas la gazeton.
La jara kotizo estas € 35,-
(por samdomanoj €12,50).
NEJ-anoj pagas € 15,-
(por samdomanoj € 5,-).

Vidhandikapitoj povas ricevi kasedan version, aranĝitan de Rob Moerbeek. Petu abonon ĉe: Redakcio@esperanto-nederland.nl.

Kunlaborantoj de Fenikso:

Ĉefredaktoro: Foppe-Klaas Hovinga
Redaktoro: Andries Hovinga
Korektantoj: Marc Konijnenberg kaj Bert de Wit
Konsilanto: Ineke Emmelkamp
redakcio@esperanto-nederland.nl

Limdato:

Materialo por la sekva numero estas bonvena ĝis la 1-a de oktobro 2022.

Informoj pri Esperanto:

Ineke Emmelkamp
Arubastraat 12, 9715 RW Groningen
(info@esperanto-nederland.nl)
tel. 050-5718842

Studosemajnfino/studieweekend:

studosemajnfino@esperanto-nederland.nl.

Esperanto Nederland enrete:

Retejo: <https://www.esperanto-nederland.nl>
Fejsbuko: facebook.com/esperanto.nederland
Telegramo: <https://t.me/EsperantoNederland>
Tvitero: <https://twitter.com/EsperantoNL>

Sendu viajn respondojn al:

redakcio@esperanto-nederland.nl
Respondu al artikoloj per maksimume 200 vortoj.
La redakcio decidas ĉu publikigi tekstojn aŭ ne.

Estraro

- **Estraro:** estraro@esperanto-nederland.nl

- **Prezidanto:** Marc van Oostendorp,
Nederlandse Taal en Cultuur
Radboud Universiteit Nijmegen,
Postbus 9103 6500 HD Nijmegen
prezidanto@esperanto-nederland.nl

- **Sekretario:** Ineke Emmelkamp,
Arubastraat 12, 9715 RW, Groningen
sekretario@esperanto-nederland.nl

- **Kasisto:** Loes Demmendaal,
Duikerlaan 160, 2903 AC,
Capelle a/d IJssel.
kasisto@esperanto-nederland.nl
tel. 010 2133320

- **Estrarano:** Peter van Noorden
Tamarixplantsoen 203,
1702 JD Heerhugowaard
petervn@esperanto-nederland.nl
tel. 06 2261 3249

- **Pri sociaj komunikiloj:**
sociaj-komunikiloj@esperanto-nederland.nl

- **Membro-administranto:**
Koos Scharroo,
Vaartweg 24G, 8382 EB, Frederiksoord
membroj@esperanto-nederland.nl
tel.06 22413267

Bv. informi pri (ŝanĝoj de) poŝtadreso, telefonnumero,
retpoŝtadreso, (eks- kaj ali)membriĝo, pagmaniero

Bankkonto:

IBAN: NL 10 TRIO 0786 8441 67
nome de Esperanto Nederland,
Capelle aan den IJssel.

Eventuala resendadreso/eventueel retouradres:

Esperanto Nederland Ledenadministratie
Vaartweg 24G
8382 EB Frederiksoord

En tiu ĉi numero

4. De la Estraro;
Federico Gobbo gajnis du premiojn
5. Bonvenon
6. UEA-novaĵoj
7. Mallongaĵoj kaj testeto
8. Studsemajnfino
9. Marc van Oostendorp in Villa VdB
10. Impresoj pri la Kultura Tago
12. Protokolo de la 31-a ĝenerala kunveno
14. Poezio kaj prozo
15. Kunvenoj esperantistaj en Nord-Nederlando
16. Interview met Jorine Captein
17. Revuo-interŝanĝo
18. Vortserĉenigmo
19. Nekrologo; Legante en malnovaj revuoj
20. Milito kaj paco
22. Tradukitaj libroj de Ladislao Pásztor
24. Esperanto Studieweekend

Amsterdama Rondo

“La Amsterdama Rondo” organizas kunvenojn de esperantistoj - ĉiun duan dimanĉon de la monato. Ni renkontiĝas, ĉu fizike, ĉu per ZOOM aŭ ambaŭ samtempe. Ĉiuj estas bonvenaj.

Organizanto:

laamsterdamarondo@gmail.com

+31 614 240 870 (Peter)

+31 23 5242 643 (Bert)

Vidu: <http://amsterdamo.nl>

Voorwoord

De oorlog in Oekraïne is nog niet voorbij en volgens deskundigen zal die ook nog wel even duren. Helaas lijkt die ook de Esperantisten te verdelen, in hen die de aanval veroordelen en in hen die er helemaal achter staan en kritiek hebben op de overheden in het Westen en op het bestuur van UEA. Het onderling contact is daardoor niet altijd gemakkelijk. Voor ons als redactie is het soms ook lastig een afweging te maken in wat we wel en wat we niet plaatsen. Zamenhof zal geweten hebben dat er nog iets meer nodig is dan alleen een gemeenschappelijke taal, toen hij nadacht over een nieuwe religie.

Gelukkig zijn er ook mooie dingen gebeurd. Zo won Federico Gobbo twee prijzen, eentje voor een essay en eentje voor een liedtekst. Federico, van harte gefeliciteerd! We zijn trots op je! 😊

Op Esperanto Tago, 26 juli, kreeg Marc van Oostendorp maar liefst twee maal de gelegenheid om te vertellen over onze taal. Hij vertelde over hoe relatief gemakkelijk het is en waarom Zamenhof het heeft bedacht. Leuke gesprekken om terug te luisteren. Laten we ook eens bedenken hoe we vaker met iets leuks op de radio kunnen komen. We hoeven niet te wachten tot Esperanto de wereldtaal geworden is, zoals Bert Kranenbarg van BertOp5 voorstelde. We kunnen er ook voor zorgen dat Esperanto snel de wereldtaal wordt. Dat kan natuurlijk ook.

Dit voorjaar vonden meerdere bijeenkomsten plaats. De Culturele Dag (Kulturo Tago) in Woudrichem was erg geslaagd. De aanwezigen wisten zich welkom geheten in dit mooie stadje en genoten volop. Ook de Esperantisten uit Noord-Nederland kwamen enkele keren bij elkaar, onder meer in Leeuwarden, waar ze genoten van een boottocht en een gezamenlijk eten.

In dit nummer is er ook weer ontspanning: de taaltest, de woordzoeker en nieuwe gedichten. Je kunt twee teksten van Joost Franssen lezen, die hij schreef tijdens het afgelopen studieweekend. En o ja, over het studieweekend gesproken, in oktober vindt er weer eentje plaats. Dan hopen we velen van jullie weer te zien.

We wensen je een fijne nazomer toe en veel leesplezier.

Foppe-Klaas Hovinga
Hoofdredacteur

Foto sur la kovrilo

Federico Gobbo kaj Bert de Wit antaŭ la kafejo/restoracio Gewoon Ploon en Woudrichem. La 25-an de Junio Esperanto Nederland tie organizis Kulturagan Tagon. Estis tre agrabla tago kun diversaj agadoj. Oni povis viziti muzeon pri fiŝkaptado aŭ traduki poemojn. Kune ili havis bonegan manĝon kaj aŭskultis muzikon de Kajto. Vidu la fotojn de ĉi tiu tago sur paĝoj 10 kaj 11. Foto de Andries Hovinga.

De la estraro

Nun estas vera feria periodo. Ĉu vi ferias enlande? Aŭ ĉu vi iras al alia lando? Por la redaktoro Foppe-Klaas ne estas ferioj! Li atendas mian kontribuon.

La estraro zumis la 17-an de Junio 2022, kaj preparolis aktualajn temojn. Unue ni decidis fiksi la daton de la venonta jarkunveno de Esperanto Nederland. Ĝi okazos la **10-an de junio 2023**, en la urbo Utrecht. Notu jam tiun daton! La raporton de la pasinta jarkunveno vi povas jam nun legi en tiu ĉi Fenikso. Tagordon, raportojn kaj ideojn vi certe trovos en venontaj Feniksoj.

La venonta studosemajnfino okazos la 14-an, 15-an kaj 16-an de oktobro. Kompreneble en 'nia' ejo Krikkenhaar! Jam alvenis 15 aliĝoj el Nederlando kaj Belgio. Ĉu vi interesiĝas? Aliĝu tuj!

Ankaŭ por la posta studosemajnfino ni fiksas la datojn, la 28-an, 29-an kaj 30-an de Aprilo 2023.

La 25-an de junio okazis kultura kunveno en la bela urbeto Woudrichem. Niaj membroj Jorine, Korine kaj Smaranda organizis interesan tagon. Vi trovos artikolon en tiu ĉi Fenikso. Ĉu vi pretas organizi kulturalan tagon en via urbo? Anoncu vin ĉe la estraro.



Germana Esperanto Asocio kunlaboris kun Esperanto Nederland kaj ricevis subvencion de Erasmus+. La estraro preparolis la t.n. Konkludan Kunvenon de tiu kunlaboro. Necesas havi kunvenon en Nederlando por pravigi la subvencion. Ni planis organizi ĝin en Groningen, la 25-an, 26-an kaj 27-an de novembro 2022. La programo ankoraŭ ne pretas. Ni informos vin pere de Fenikso, nia retejo kaj Facebook.


Dum la Esperanto-tago, la 26-an de Julio, okazis du intervjuoj kun Marc van Oostendorp. Unu okazis en la programo Villa JvB kaj la alia en radioprogramo en Radio 5. La 'Taalpost' menciis la tagon. En la tagoj poste alvenis tri novaj membroj!

La venonta estrarkunveno okazos la 10-an de Septembro. Ni planas fizike kunveni en Utrecht, kiel antaŭe. Estos la 184-a kunveno!

Ineke Emmelkamp, Groningen, la 31-an de Julio 2022

Federico Gobbo gajnis du premiojn

La rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA estis diskonigitaj la 8-an de Aŭgusto dum la Universala Kongreso de Esperanto. Nia membro Federico Gobbo ricevis du premiojn en tiu ĉi konkurso.



En la branĉo Eseo Federico ricevis la trian premion por la eseo "La fundamentaj leĝoj de esperantista stulteco". En la branĉo Kantoteksto li ricevis la trian premion por "De kie vi estas?"

Fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 1053

La eseo "La fundamentaj leĝoj de esperantista stulteco" de Federico Gobbo ofertas originalan interpreton de la eseo de la itala historiisto pri ekonomiko Carlo Cipolla (1922 - 2000) laborinte en Usono, kiu verkis pamfleton pri la leĝoj de homa stulteco kiel kristnaskan donaceton al siaj geamikoj en 1976. Tiu eseo fariĝis fama kaj estis publikigita en la itala (1988) kaj en la angla (2011). La originala kontribuo de la premiita eseo ĉe la Belartaj Konkursoj 2022 estas prezenti la kvin leĝojn per Esperanto-rilatajn ekzemplojn, kaj aldone klarigon pri la graveco de la eltrovo de Cipolla por Esperantistoj, kaj mesaĝon pri paradoksa signifo de "danĝera lingvo".

La kantoteksto "De kie vi estas?". Ĝin komponis Federico Gobbo, kune kun melodio, kadre de la muzikprojekto intErna idEO, duopo kun la itala muzikisto Fabrizio Rabacchi. Jam estis publikigitaj "Jen", "Mi ne Komprenas Kial", kaj "Letero al Duolingano". La kantotekstojn ligas la temoj Esperantujo kaj Esperanto-identeco. En la premiita kantoteksto la temo estas la kompleksa rilato de Esperanto-parolantoj inter persona kaj devena identecoj.

Bonvenon!

Ĉi-foje estas denove tri novaj membroj. Jorn Schreijer el Apeldoorn, Dina Tuinhof el Amsterdamo kaj Cecilia van Loon el Roosendaal aliĝis. Bonvenon al vi tri.

Dina trovis eraron en la bita versio de la broŝuro 'Esperanto – Van Taalproject tot Levende Taal'. Frans Schild tuj korektis ĝin. Kaj tuj poste mi ricevis la sciigon ke Dina membriĝis! Cecilia jam komencis studi Esperanton per la pingvena retkurso kaj mendis tuj la gramatikan libron de Haveman-de Vries. Samtempe ŝi mendis plurajn librojn, kiuj staradas en mia koridoro!

Novaj membroj povas senpage ricevi la gramatikan lernolibron de Roel Haveman kaj Arjen-Sjoerd de Vries. Nur sendokostojn ili pagas. Ĉu vi jam mendis la libron? Ankaŭ se vi membriĝis antaŭ kelkaj jaroj vi rajtas mendi la libron.

Deze keer drie nieuwe leden: Jorn Schreijer uit Apeldoorn, Dina Tuinhof uit Amsterdam en Cecilia van Loon uit Roosendaal hebben zich als lid aangemeld. Van harte welkom.

Dina vond een foutje in de digitale versie van de brochure 'Esperanto – van Taalproject tot Levende Taal'. Frans corrigeerde dat snel. En daarna werd Dina meteen lid! Cecilia is enthousiast bezig met de cursus op Pingveno.net! Zij bestelde meteen ook het grammaticaboek van Haveman – de Vries. En meteen ook een aantal boeken, die nog steeds bij mij in de gang staan.

Iedereen die lid is van Esperanto Nederland kan een gratis exemplaar van het grammaticaboek van Haveman-de Vries bij mij bestellen! Je betaalt alleen de verzendkosten!



Jorn, Dina kaj Cecilia : vi estas bonvenaj partopreni la studsemajnfinojn. Bona okazo renkonti aliajn homojn kiuj lernas Esperanton.

Jorn, Dina kaj Cecilia: jullie zijn ook van harte welkom om deel te nemen aan een studieweekend. Een leuke en leerzame bijeenkomst. En tegelijkertijd een gezellig weekend om kennis te maken met andere Esperantisten.

Ineke Emmelkamp,
sekretario/secretaris
6-a de Aŭgusto 2022



Over het boek:

"Esperanto, Grammatica met Oefeningen"

ISBN: 9789062831449

Prijs bij Bol.com: € 64,90

Prijs bij UEA: € 30,00

Voor nieuwe leden gratis.

Adrienne Pásztor

Ploras mia koro

(Sír a szivem)

Pro pluv' malsekas korto. Nun vento fajfas.
Enkorte la arbfolioj daŭre dancas.
Somer' forpasis plene per malgajeco,
forpasis la viv' de mia bona edzo.
Vane belas jam l' aŭtuna koloreco
mi tre sentas la mankon de mia edzo
premas mian koron la kruela morto
suriĝas la koron korpremega doloro
eligas doloran ploron mia koro.

(2. 11.2021 - origine verkita en Esperanto)



Foto: Canva

Clay Magalhães

Clay Magalhães finas sian laborperiodon ĉe UEA – KKS ŝanĝiĝas.

La kontrakto kun Clay Magalhães, kiu laboris ĉe UEA kiel Konstanta Kongresa Sekretario (KKS) dum 19 jaroj, finiĝas hodiaŭ, la 31-an de julio 2022. Clay ĉeforganizis la Universalajn Kongresojn (UK) ekde 2003, transpreninte la taskon de Nikola Rašić. Li estas la KKS, kiu dum plej longa periodo en UEA okupis tiun postenon, kaj jam antaŭe li volontulis por la Kongresa Fakoj.

Sub lia egido organiziĝis multnombraj kongresoj. Inter tiuj ankaŭ la jubileaj kongresoj en Roterdamo (100-jariĝo de UEA), Bjalistoko (150-a naskiĝdatreveno de L.L. Zamenhof) kaj Lillo (100-a UK). La kongreso en Lillo estis la plej granda kongreso, kiun li organizis, kun 2698 aliĝintoj el 80 landoj. La lasta UK, kiu okazis sub lia gvido, estis tiu de

Lahtio en 2019. Sendube li restas en la memoro de sennombraj UK-partoprenantoj pro sia karaktero, ĉiam zorgema kaj afabla.

La Estraro de UEA, la Ĝenerala Direktoro de UEA kaj la kolegoj kaj ekskolegoj de Clay elkore dankas pro lia granda sindediĉo por la movado kaj deziras al li sukceson en ĉio, kion li entreprenos!

Pri la Kongresa Fakoj de UEA nun okupiĝas Dorota Rodzianko kune kun siaj kolegoj, laŭ nova kontrakto de UEA kun E@I. Ilia unua kongreso estas la baldaŭ okazonta UK en Montrealo.

Fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 1051



Unesko-Kuriero

La revuo Unesko-kuriero en Esperanto estas en tiu ĉi tempo la plej bela revuo ekzistanta en Esperanto. Se vi ne kredas tion, vi evidente neniam foliumis numeron, kaj tamen ĝi estas senpage elŝutebla el la paĝaro de UEA: https://uea.org/revuoj/unesko_kuriero.

Produktas ĝin, laŭ interkonsento kun UEA kaj Unesko, Ĉina Esperanto-Ligo kaj praktike tradukas ĝin al Esperanto el la lingvoj angla, franca kaj hispana [kiuj estas la unuaj tekstoj haveblaj] areto da spertaj esperantistoj, kies laboro estas poste reviziata de aliaj spertaj esperantistoj. Multaj el la tradukantoj estas maljunaj, kaj do necesas nun iom grandigi la tradukantaron.

Se vi povas traduki el unu el tiuj lingvoj al Esperanto, la redaktantoj feliĉe akceptos vin. Sendu mesaĝon al Revon (Xie Ruifeng) (13699177347@163.com) aŭ al mi.

Renato Corsetti (renato@esperanto.org)



La arkivo de UEA nun loĝas en Vieno

Entute 158 kestoj da arkivaj kaj bibliotekaj materialoj estis transdonitaj de UEA al la Internacia Esperanto-Muzeo ĉe la Aŭstria Nacia Biblioteko. Krom la tuta historia arkivo de UEA, el la biblioteko de UEA estis transdonitaj tiuj verkoj, kiujn la biblioteko en Aŭstrio ankoraŭ ne posedis. Almenaŭ 95 procentoj el la enhavo de la biblioteko Hector Hodler tamen plu restas ĉe UEA. Tiu ĉefa parto de la biblioteko ŝajne estos transportita al Slovakio.

La arkivo konsistas el plej diversaj materialoj, precipe leteroj, manuskriptoj, tiposkriptoj, fotoj, afiŝoj, faldfolioj kaj aŭdvidaj dokumentoj. Ĝi enhavas multajn korespondaĵojn de gravuloj.

Fonto: Libera Folio: <https://mallonge.net/225arkivo>



Mikrosofto ĉesigas sian aŭtomatan vizaĝrekonon

Etika retakso igis Mikrosofton decidi ĉesigi serion da aplikaj bazitaj sur artefarita inteligento. Ekzemple, la firmao ĉesigos emocian rekonon kiel parton de vizaĝrekonon Azure Face.



Mikrosofto lanĉis la emocian ilon en 1995 kiel unu el la sukcesoj de maŝinlernado-teknikoj. Iu povas havi sulkiĝon sur sia vizaĝo, sed tio ankoraŭ ne signifas, ke ri estas kolera. Estas nescience asocii vizaĝojn kun emocioj. La ilo ankaŭ supozas, ke vizaĝaj esprimoj estas universalaj, kaj ne konscias pri kulturaj diferencoj; tekniko kiu taksas blankajn teknikistojn kiel la normon.

Kiel rezulto, la emocio-rekono ne plu disponeblas por novaj uzantoj de Azure Face. Jam ekzistantaj uzantoj povas uzi ĝin ĝis la 30-a de Junio 2023. Mikrosofto limigis la uzon de partoj al pli striktaj reguloj. Partoj, per kiuj ekzemple vizaĝoj povas esti aŭtomate malklarigitaj, restas facile alireblaj. Sed partoj kiuj aŭtomate donas etiketojn al vizaĝoj, ekzemple sekso, vizaĝhararoj, hararo kaj ŝminko ankaŭ estos forigitaj.

Fonto: AG Connect 22-a de Junio 2022

Averto el Ukrainio

Retpoŝte Bohdan Drul el Ukrainio petis nin, redaktorojn, averti legantojn de Fenikso pri grava nuklea milito, kiu okazos kaj jam komenciĝis. Laŭ li, la rusoj estas tiel senzorgaj pri la nuklea radiado de Ĉernobil, al kiu la soldatoj mem estas elmetitaj, ke ŝajnas kvazaŭ ili ne scias, kion ili faras.

Ni pensas, ke la teksto ne taŭgas por Fenikso, sed se vi volas legi lian tekston, sendu al ni retmesaĝon, kaj ni plusendas la tekston al vi.

<<Dum la UK Jevhen Kovtonjuk, la komitatano A por Ukrainio, rakontis pri la milito en Ukrainio, kaj rakontis pri la situacio en sia lando.

Fonto: <https://mallonge.net/225jeko>>>

La redakcio, Redakcio@esperanto-nederland.nl

Lingva testeto

Tiu ĉi testeto konsistas el du demandoj. Ĉu vi scias la ĝustajn respondojn?

- 1) Kion oni vi faru kiam via ĉambro estas *mucida*?
 - a. Oni plialtigu la temperaturon de la hejtado
 - b. Oni enŝaltu lampon
 - c. Oni malfermu fenestron
- 2) Por kio utilas la neoficiala vorteto *ri*?
 - a. Ĝi estas uzata kiel elkrio por esprimi fortan aprobon aŭ laŭdon
 - b. Oni povas uzi ĝin kiam ne eblas elekti inter *li* kaj *ŝi*
 - c. Ĝi aperas en eksperimenta poezio kiel mallonga formo de *iri*

Vi povas trovi la respondojn al la testo sur paĝo 23.

Arjen-Sjoerd de Vries

Beneluksa Kongreso en leper

Aliĝu al la Beneluksa Kongreso de la 23-a ĝis la 25-a de septembro en leper (Belgio). Helpu nin reklami Esperanton dum la pac-evento en la urbocentro! Pli da informoj ĉe: <https://eventaservo.org/e/BNLKS2022>

Neem deel aan het Benelux-congres van 23 tot 25 september in leper (België). Help ons Esperanto bekend te maken tijdens het lokale vredesevenement in het stadscentrum! Meer info op eventaservo.org

Viktor Bout eble estos liberigita

Armillkomercisto Viktor Bout, ankaŭ konata kiel la Komercisto de Morto, estos liberigita se la interkonsento inter Rusio kaj Usono sukcesos. Li povas esti interŝanĝita kun 2 usonanoj kiuj estas en malliberejo en Rusio. Viktor Bout parolas plurajn lingvojn, inkluzive de Esperanto.



Viktor Bout
Foto: Wikipedia

Fonto: NRC, la 31-an de julio 2022



14 - 16 oktobro 2022

Esperanto-Studsemajnfino

De nederlandse vertaling van deze tekst vind je op de achterzijde van dit blad.

Sur la paĝo: fragmentoj el video de Gabi EO pri la lasta studsemajnfino.



Bonvenon

Jam komenciĝis preparaj laboroj por la studosemajnfino je 14a-16a de oktobro 2022. Jam venis pluraj aliĝoj, do se vi volas certigi al vi partoprenon, nepre aliĝu frue!

La programo de la semajnfino estas jam konata al niaj fidelaj partoprenantoj. Vendredvespere oni alvenos, kaj estos tempo por babilo kaj interkonatiĝi. Sabate komenciĝos la vera laboro: intensa programo de entute kvin lecionoj, de mateno ĝis vespero. Vespere oni ripozos kaj amuziĝos, kaj eble estos muzika programo. Dimanĉe pli da lecionoj, sed ankaŭ estos tempo por ĝui la belan naturon de tiu regiono. Finiĝos la programo ĉirkaŭ la 15-a horo.

Instruado okazos kvarnivele. Ĉe aliĝo vi indiku vian nivelon: absoluta komencanto, lernanto en komenca kurso, ĵusfininto de komenca kurso, aŭ progresinto. La instruadon prizorgos diversnaciaj kapablaj Esperanto-instruistoj, do estu certa ke vi lernos multe!

Nia kursejo denove estos la naturamika domo Krikkenhaar apud Almelo. Ĝi bonege kontentigis nin en la pasintaj kunvenoj: bela ĉirkaŭaĵo, sufiĉe da dormlokoj, grandaj ĉambroj por kunestado kaj studado, bone ekipita kuirejo. Dum la tuta semajnfino la kuireja teamo dorlotos nin per bongustajoj. Ili estas nur duope, do iom da helpo de la partoprenantoj estos bezonata por tablopretigado kaj ordigado.

Ni esperas bonvenigi multajn el vi en Krikkenhaar!

Por kiu Se vi neniam antaŭe lernis Esperanton, aŭ via Esperanto ne estas tiom bona kiom vi ŝatus, vi estas tre bonvena. Lecionoj estas instruitaj je malsamaj niveloj. La emfazo estas ekzercado de Esperanto-parolado en grupetoj.



Dum siaj vojaĝoj tra Eŭropo Gabi EO vizitis ankaŭ nian landon kaj partoprenis nian studsemajnfino en Marto. Li raportis pri ĝi en filmeto kaj intervjuis nian Ineke Emmelkamp. Spektu lian videon kun la intervjuo: <https://youtu.be/8u27RaAUW9M>

(La aliaj videoj de Gabi EO estas ankaŭ spektindaj.)



Kiam La studsemajnfino okazos de vendrede, la 14-a ĝis la 16-a de Oktobro 2022.

Kie Natuurvriendenhuis Krikkenhaar, Krikkenhaar 11, 7627 PA Bornerbroek.

La kotizoj Partopreno kostas po € 85,-. Por membroj de Esperanto Nederland aŭ alia landa asocio € 75,-. La prezo inkluzivas: la tutan programon, tranoktadon, manĝojn, kafon kaj teon inter la lecionoj.

Pli da informoj kaj la aliĝilon vi trovas sur la retpaĝo de Esperanto Nederland: <https://esperanto-nederland.nl/studieweekend>

Ineke, Lilian, Arjen-Sjoerd

Marc van Oostendorp in Villa VdB en bij BertOp5

Op dinsdag 26 juli, de Dag van Esperanto (Esperanto Tago) kwam Marc van Oostendorp twee maal op de radio. In het Radio 1 programma Villa VdB, NPO Radio 1, sprak Jurgen van den Berg met hem. Op deze pagina hoe dit gesprek verliep. Dezelfde dag had hij ook nog een gesprek met Bert Kranenbarg in BertOp5 (Radio 5).

Het interview begint met enkele fragmenten over het Esperanto in het Esperanto en van de landelijke tv. Jurgen verwelkomt Marc met de zin: “Bonvenon al nia programo por paroli pri Esperanto.” Marc begint door zijn respect te uiten voor Ludowic Lejzer Zamenhof, die 135 jaar geleden in eigen beheer het eerste boekje over de taal uitgaf, waar hij geld voor bijeen schraapte en waar hij jarenlang aan had gewerkt. Hij gaat in tegen de bewering, die in een van de fragmenten werd genoemd, dat Esperanto nooit de wereldtaal is geworden, zoals Zamenhof wel had gehoopt. Marc: “Dat is misschien waar, maar dat iemand zomaar, in een of andere uithoek van het Russische rijk een boekje uitgeeft en dat er dan meteen allerlei mensen zijn die die taal gaan leren en dat er dan 135 jaar later nog steeds mensen zijn die die taal iedere dag gebruiken, dat is op zichzelf al heel apart.”

Op Jurgen zijn vraag naar het idee achter de taal vertelt Marc uit dat het de bedoeling van Zamenhof was: “Om een tweede taal voor iedereen te maken. Niet om bestaande talen weg te duwen, maar te zeggen: ‘In het internationale verkeer tussen volkeren moet het ene volk de taal spreken van een ander volk.’ - Toen was het nog Frans, nu is het Engels. – ‘Daarmee zijn we eigenlijk altijd in het nadeel in vergelijking met de moedertaalsprekers. Nee, zo moet het internationale verkeer niet worden georganiseerd. Iedereen moet een taal leren en dan moet die taal ook zo makkelijk mogelijk zijn, die moet daar zo geschikt mogelijk voor zijn.’”

Marc legt ook de basisprincipes van het Esperanto uit. Het ene principe dat je alle onregelmatigheden weg haalt uit de taal. Als voorbeeld geeft hij het werkwoord ‘zijn’, wat in andere talen meerdere woorden heeft, maar in het Esperanto altijd “est.” is. Het andere principe dat je zo min mogelijk woorden moet leren, door woorden zoveel mogelijk van elkaar af te laten leiden: sana, malsana, bona, molbona.

Jurgen reageert daarop: “Ga maar naar een gemiddelde bijeenkomst. Daar kletst men allemaal langs elkaar heen. Dus als iedereen dezelfde taal zou kunnen spreken, dat zou toch wel mooi zijn. Ik vind het basisidee eigenlijk wel erg mooi.”

Jurgen vraagt hoe Marc zelf het Esperanto zelf geleerd heeft en Marc vertelt dat dat niet eens zozeer vanwege dat basisidee was, maar dat hij talen leuk vond en geïnteresseerd was in hoe Esperanto was opgebouwd. Hij vond

een Esperanto-leerboekje in de bibliotheek, schreef de mensen aan die het boekje hadden gemaakt en die waren zo enthousiast dat een dertienjarige interesse toonde. “Toen mocht ik gratis een cursus doen en sindsdien ben ik verkocht.”

Over de toekomst van het Esperanto geeft Marc aan: “Het is waar dat niet iedereen het Esperanto spreekt, maar dat geldt ook voor alle idealen. Honderd jaar geleden wilden mensen ook de honger de wereld uit helpen of zorgen dat er nooit meer oorlog kwam. Dan kun je ook zeggen: Dat is niet gelukt, dus laat maar zitten... Dus ik denk: ‘Het basisidee is niet alleen maar goed. Het is superbelangrijk. We hebben zulke grote problemen in de wereld die we eigenlijk alleen maar kunnen oplossen door met elkaar te praten wereldwijd. Dat idee is zo belangrijk dat het de moeite waard is om dat naar voren te blijven brengen.’”

Jurgen: “Met dit gesprek zijn misschien toch nog weer wat mensen op het spoor gezet van Esperanto”. Marc roept de luisteraars daarop op om lid te worden van Esperanto Nederland.

Programma's terugluisteren

Het gesprek met Jurgen van der Berg in Villa VdB:
<https://mallonge.net/225villavdb>

Het gesprek met Bert Kranenbarg in BertOp5:
<https://mallonge.net/225beop5>



Impresoj pri la Kultura Tago

Sabaton, la 25-an de junio okazis la Kultura Tago en Woudrichem. Woudrichem estas malgranda fortikaĵa urbo en Nordbrabanto ĉe la rivero Merwede.

1. Vendredon vespere la 24an de junio 2022 - "Antaŭkongreso" alvenis la unua grupeto ĉe Jorine Captein en Woudrichem.



2. Nia nova prezidanto Marc van Oostendorp bonvenigis la ĵus alvenintajn partoprenantojn en kafejo / restoracio 'Gewoon Ploon'.



3. Yves Nevelsteen prizorgis la Libroservon de FEL (Flandra Esperanto-Ligo) el Antverpeno. Krom libroj estis broŝuroj kaj revuoj por disdoni.



4. Sub gvido de Karina Scharff unu grupo tradukis poemojn.



5. Alia grupo havis promenadon tra Woudrichem.



6. Estis bona lunĉo en kafejo / restoracio 'Gewoon Ploon'. Sinjorino Apolonia, la ĉefo de la restoracio, kiu malfermiĝis antaŭ nelonge (ni fakte estas la unua granda grupo) rakontas al ni pri kio atendas nin kiel manĝo. Loes tradukis en Esperanton.



7. Ni vizitis la muzeon pri fiŝkaptado en Woudrichem kun interesa ĉiĉerona gvidado. Jorine loĝas en Woudrichem kaj estis la ĉefa organizanto de tiu ĉi Kultura Tago. Ŝi prezentis la ĉiĉeronojn al ni, kun traduko de kasisto Loes. Poste venis Kajto (Ankie van der Meer kaj Nanne Kalma) kiu sukcesis logi nin per belaj maristaj kantoj (en pluraj lokaj nederlandaj dialektoj) reen al la koncertejo, kafejo 'Gewoon Ploon'.



8. Sekvis koncerto de Kajto (Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer) en kafejo Ploon. Belaj kantoj en bona akustika salono kun interesa bildo je la fono. Loes prezentis Kajto-n al la publiko. Ĉeestis kelkaj loĝantoj el Woudrichem. Je la fino prezidanto de asocio Esperanto Nederland Marc van Oostendorp nome de la asocio kore dankis Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer pro ilia belega koncerto. Ili ĉiuj ege ĝuis la bonan etoson kune.



9. Por tiuj kiuj deziris ankoraŭ iom resti en la pitoreska urbeto sinjoro Jop kaj edzino kuiris elstaran vespermanĝon en sia privata domo en Woudrichem.



Fotoj: Andries Hovinga



Protokolo de la 31a ĝenerala kunveno de Esperanto Nederland

Dato: la 21a de majo 2022.
Loko: Partycentrum Floor, Dorpsstraat 36,
6741 AL Lunteren.
Tempo planita: de 10:30 ĝis 13:00.
Ĉeestis la estraro: Ineke Emmelkamp, sekretario, Loes
Demmendaal, kasisto, Andries Hovinga,
estrarano.
Ĉeestis: 24 membroj (inkluzive la estraron).
Envenis: 2 rajtigiloj; entute do estis 26 rajtigitaj voĉoj.
Prezidis: Hiddo Velsink.
Protokolis: Rob Groeneveld.

1. Malfermo de la ĝenerala kunveno

- La kunveno estis malfermita je la 10:33a h.
- La ĉeestantoj ekstaris kaj honoris la forpasintajn membrojn dum momento da silento: s-ino Vera Tuinder, s-ino Dineke Paetzel-Veenstra, s-ro Hans Reddingius, s-ino Teunie Schonewille-Roos.
- La voĉdonojn kalkulos Ralph Schmeits kaj Korine Cheizoo.
- Unu el la ĉeestantoj kontraŭis ke ria foto aperu en Fenikso.

2. Fikso de la tagordo kaj envenintaĵoj

La tagordo estis akceptita.
Aldono: punkto 9.3. Ineke Emmelkamp diros kelkajn vortojn pri la laborgrupo Informado, anstataŭ Marc van Oostendorp, kiu estis malsana.

3. Protokolo de la 30a ĝenerala kunveno en 2021

Punkto 15. Verloren van Themaat-premio. La premio ne estis aljuĝita por 2019 kaj 2020.

La protokolo estis aprobata. Aldonaj rimarkigoj kaŭze de la protokolo: aranĝi hibridan kunvenon estas sufiĉe komplike. La estraro decidis ne havi hibridan kunvenon ĉi-foje. Postaj kunvenoj povus okazi en hibrida maniero, se ni sukcesus aranĝi tion.

Loes klarigis la situacion de la libroj kiujn posedas Esperanto Nederland. Esperanto Nederland reprenis ilin de UEA kiu ĝis nun komisi-vendadis ilin. Ĉar multaj libroj probable neniam estos venditaj, la estraro decidis disdoni parton kaj parton doni al membroj kaj aliaj por meti en la etajn stratlibrejojn ("minibijs"). Antaŭvideble UEA donacos pliajn librojn kiuj estos neinteresaj por vendi post la translokiĝo de la libroservo al Slovakio (ekz. vortarojn Esperanto-Nederlanda).

4. Agadraporto pri 2021

Unu korekto: Prof. Federico Gobbo ne transdonas librojn al la estro de la biblioteko, sed simple al la biblioteko. La agadraporto estis aprobata. La respondeco de la estraro pri la financoj de la asocio ankaŭ koncernas la sekciojn, laŭ averto de Peter van Noorden. Loes demandis la reprezentantojn de la sekcioj ĉu ili posedas propran bankkonton. Necesos formaligi regulojn pri sekcioj.

5. Financaj raporto pri 2021

5.1. Raporto de la kaskontrol-komisiono

La kaskontrolkomisiono konstatis ke la raportoj pri 2021 estas en ordo kaj rekomendis malŝarĝon de la kasisto. Tio estis aprobata kun aplaŭdo.

5.2. Rezultkonto pri 2021 kun klarigoj

Aprobata.

5.3. Bilanco je 31-12-2021

Aprobata.

6. Proponoj

6.1. Propono de la estraro: fikso de la kotizoj por 2023. La estraro proponas ne ŝanĝi la kotizojn

La kunveno akceptis la proponon.

6.2. Buĝeto kaj Laborplano 2023

Aprobata. Iu demandis ĉu Fenikso povus aperi en PDF-formo. Kiuj membroj eventuale pretus ricevi la PDF-ekzempleron? La papera eldono certe restos. Pri la nombro da paĝoj: la estraro insistis ke la redaktoro limigu la nombron al maksimume 20 aŭ 24. Por atingi tion, la redakcio povas esti pli kritikema pri la publikigotaj paĝoj, mallongigi artikolojn kaj uzi alian litertiparon.

6.3. Plano por informado

Ineke: laborgrupo pri informado kunvenis kaj kunvenos; ĝi havas plurajn membrojn, ankaŭ Marc van Oostendorp. La laborgrupo pri informado esploras la eblon renovigi la retejon kaj kontaktos la retejan administranton pri tio. Ans: la estraro respondecas pri la laborgrupoj. Estus bone fiksi tiun strukturon.

7. Elektoj

7.1. Arbitracia komisiono

Anneke Schouten-Buijs estas membro de la komisiono ĝis 2022. Ŝi estas reelektebla por nova trijara periodo. La aliaj du membroj ĝis nun estis: Johan Swenker (2020-2023) kaj

Marc van Oostendorp (2020-2023). Ĉar Marc estas kandidato por la estraro, ni bezonas novan membron. Hiddo Velsink eniros la Arbitracian Komisionon. Ans Bakker estos rezerva membro.

7.2. Estraro

Dum la elektoj envenis 26 validaj voĉdoniloj.

7.2.1. *Elekto de prezidanto*

Kandidato estis Marc van Oostendorp. Li ne ĉeestis pro malsano. Li estis elektita kiel prezidanto kun 25 jesoj kaj 1 ne.

7.2.2. *Elekto de kasisto*

Unua voĉdono: ĉu Loes rajtas resti dum tria periodo?

Rezulto: 25 jesoj, 1 sindeteno. Dua voĉdono: ŝi reelektiĝis kiel kasisto kun 26 jesoj.

7.2.3. *Andries Hovinga demisias kaj ne estas reelektebla*

Ineke dankis Andries kaj donis donacon al li.

7.2.4. *Elekto de aliaj estraranoj*

Peter van Noorden estis kandidato. Li estis elektita kun 26 jesoj.

7.3. Kaskontrolkomisiono

Por la jaro 2022 estos Ronaldo Nobel. Smaranda Tintu estis elektita kiel membro. Ans Bakker estos rezerva membro.

7.4. Komitatano A ĉe UEA

Kandidato estas serĉata. Ans: Komitatano estas grava funkciulo. Li aŭ ŝi konu sian asocion kaj ankaŭ UEA. La laboro daŭras la tutan jaron, ne nur dum la UK, kiam la Komitato kunsidas fizike. Preferinde estas havi neniun funkciulon ol malbonan.

8. Fenikso

La ĉefredaktoro Foppe-Klaas prezentis kiel Fenikso estas redaktata kaj presata. Li dankis la kunhelpantojn. Iu plendis ke Fenikso estas malfacile legebla pro la kolora fono de iuj artikoloj. La redakcia konsilio esploris tion kaj konsilis al la redakcio uzi programon por kontroli la legeblon de la uzataj koloroj. Rob Moerbeek atentigis, ke por tiuj kiuj opinias ĝin malfacile legebla, kasedoj estas disponeblaj.

Foppe-Klaas diris ke li havas ideon unu aŭ plurfoje eldoni nederlandlingvan revuon por ke ne-esperantistoj povu legi pri Esperanto kaj ĝia movado.

Reagoj: por inspiri vi povas vidi la revuon "Horizontaal".

Ekzemple, la Itala Esperanto-Federacio eldonas tian teman numeron unufoje jare.

9. Informado pri diversaj temoj

9.1. Germana Esperanto-Kongreso en kunlaboro kun Esperanto Nederland okazos en junio 2022 en Oldenburg, Germanio.

Nederlandanoj kontribuos al la kongreso, kies temo estas Daŭripovo.

9.2. Kultura tago

Korine klarigis pri la Kultura Tago, la 25an de junio en Woudrichem. Eblas aliĝi al ĝi per la retejo. Sugesto: invitu la volontulojn kiuj aktivas en Rotterdam.

9.3. Informoj pri aliaj temoj

Bert de Wit: instruisto en elementa lernejo en Hoofddorp serĉis informanton pri Esperanto. Bert vizitis la lernejon kaj kune ili instruis la lernantojn. La instruisto poste diris al li ke la infanoj estis entuziasmaj pri Esperanto.

10. Jubileantoj

Ni honoris la membrojn, kiuj festis sian 50-jaran membrecon:

- Wiebren Akkerman

- Loes Demmendaal.

Ineke donacis gratuldokumenton al Loes. Al Wiebren ŝi sendos ĝin.

Ni menciis du membrojn kiuj antaŭ 25 jaroj aliĝis. Ineke donis gratulkarton al Vinus Lathouwers, kiu ĉeestis la kunvenon. La duan karton ŝi sendos al Marc van Oostendorp.

11. Verloren van Themaat-premio

Ne envenis proponoj por la premio por 2021.

12. Ronddemandado

Ans Bakker disdonis poŝtkartojn destinitajn al aktivuloj kiuj ne povis ĉeesti la jarkunvenon. Ŝi petis ke tiuj kiuj ĉeestas subskribu la kartojn.

Korine: la aliĝilo por la kultura tago estas en la retejo.

Pieter: mi sugestas kontakti esperantistojn inter la ukrainaj rifuĝintoj en Nederlando.

Bert: skribu gazetarkomunikon pri la prezidanteco de Marc van Oostendorp.

Federico: la ukraina esperantisto Ihor Jasinski estas en Amsterdam.

La sanstato de la katedro estas bona: la mandato daŭros pluajn kvin jarojn.

Rob Moerbeek: Atentigas pri la daŭra aktivado de NoSoBe.

13. Fermo

Je la 13:12.

Lunteren/Zoetermeer,

La 18an de junio 2022.

Rob Groeneveld.

Poezio kaj prozo

Joost Franssen

Jen estas parto de mia sperto de la lecionoj de la studsemajnfino en aprilo, precipe rilate la verkadon, kies rezulton oni instigis min publikigi ĉi tie.

Dum la studsemajnfino en marto mi partoprenis la lecionojn de Lode Van de Velde kun tri aliaj Esperantistoj el Nederlando kaj Francio. La ĉefa temo estis tradukado kaj verkado de poezio kaj prozo. Kelkaj el tiuj lecionoj rezultigis iun verkaĵon, kiujn oni min instigis prezenti ĉi tie.

Dum unu el la taskoj Lode igis nin elekti poŝtkarton kun bildo, kiu funkciis kiel inspiro por laŭplaĉe verki ion. Inter diversaj bildoj, jen abstraktaj, jen absurdaj, jen belaj, jen malfavoraj, jen emociigaj, mi elektis simplan bildon de krano, kiu inspiris la suban mallongan mikronovelon




Foto: Canva

Krano

La akvonivelo altiĝas en hejma bano. Decidinta knabino lante mallevas sian kruron en la varman, vaporantan akvon. Post ioma alkutimiĝo sekvas la alia kruro kaj tuj trempiĝas ŝia tuta korpo en la purblankan banon. Ĉiuj ŝiaj zorgoj samtempe superŝutas ŝin, sed egale kontraŭe fordronas en la senĉesa fluo de akvo el la krano.

Ŝi frotas kaj viŝas sian per ŝminko artefaritan aspekton, malkaŝante sin nur al si mem. Lastan fojon ŝi movas la manon kun iom da forto laŭ la tuta korpo kaj finas ĉe la pojno. Trankvile ŝi klinas sin malantaŭen kaj sidkuŝas kontraŭ la rando de la bano, forgesante siajn zorgojn en la ripeta plaŭdeto de la krana fluo.

La akvo ruĝiĝas.



Foto: Canva

Trankvile sonĝas la vilaĝo
Mankas ĉie aktivec'
Ne ronĝas bestoj el sovaĝo
De ajna tip' aŭ ia spec'

Ne estas homa kompanio
Ĉie regas la silent'
Ne estas uloj kun vizio
Ne okazas sportevent'

Formortas la oldulpopolo
Vakas domoj ĉe la rand'
Ne venas juna hom' laŭ volo
Veturas ri al urb' en l' land'

Ĉu ne ĉarmon ĝi elvokas
Kun placet' el malnovaĝ'?
Urbeganoj ĝin eĉ mokas
Maltrankvile sonĝas la vilaĝ'

Kiel lasta tasko Lode donis al ni la komencan frazon “trankvile sonĝas la vilaĝo” kaj instigis nin verki ion plue. Ĝuste antaŭ la plej lasta sesio de la semajnfino, dum mi purigis mian ĉambron, la muzoj parolis al mi kaj, per iom da rima puzlado, mi kreis la supron.

Kunvenoj esperantistaj en Nord-Nederlando

Ineke Emmelkamp, julio 2022

En la somero ni ne kunvenas en nia kutima ejo aŭ per Zoom. Ni renkontas nin en belaj lokoj kaj kafumas en agrablaj lokoj.

La 23an de junio ni estis en Leeuwarden, la ĉefurbo de Frislando. Ni estis sepope. Kelkaj esperantistoj el Groningen, Leeuwarden kaj Heerenveen kaj alilanda gasto. Mi metis la daton kaj lokon en la retejo 'Eventa Servo', kaj el tio rezultis ke venis gasto el Belgio. Ben uzis Pasportan Servon kaj tranoktis kelkajn tagojn ĉe Andries. Ni trinkis kafon kaj manĝis bonajn kukojn. Kion fari poste? Andries proponis ke ni faru boatan ekskurson tra la kanaloj en Leeuwarden. Estis bona ideo kaj ni ĝuis!

Post la agrabla lunĉo ni promenis tra la urbo, kie nun estas la art-projekto Bosk. Dum 100 tagoj 'promenas' 1000 grandaj kaj malgrandaj arboj tra la urbo. Ĝi verdigas la urbo-centron! Tiu ĉi promenanta arbaro donas al la arboj voĉon: kion ni povas lerni de arboj kaj kiamaniere la arbaro rigardas al la homa mondo? Multaj diversaj prezentoj okazas dum tiuj 100 tagoj. Ĉiam la arbaro moviĝas! Ni vidis tion! Volontuloj puŝas per specialaj ĉaroj la grandajn kaj malgrandajn arbojn.

La 14an de julio ni kunvenis en la restaŭracio 'Scandinavisch Dorp', sude de Groningen. Wil kaj Smaranda venis. Triope ni babilis. Bedaŭrinde ne estis gastoj el aliaj landoj! Tamen kvalito gravas, ĉu ne? Ne la kvanto! Estis bela vetero. Smaranda kaj mi decidis lunĉi tie. Skandinaviaj manĝoj: tunnebrød (pano kun salmo) pølser (bulko kun dana kolbaso, cepoj kaj saŭco) kaj kiel deserto por mi: rødgrøt med flød (gelato de ruĝaj frukoj, glacio kaj kremo).

Mi ofte manĝis ĝin en Danlando, kaj malofte trovas ĝin en Nederlando. Bonaj memoroj pri miaj vojaĝoj al la norda parto de Eŭropo alvenis en mia kapo!

La 18an de aŭgusto ni kune vizitos la novan belan konstruaĵon Forum en Groningen.

Feliĉe homoj denove ekuzas Pasportan Servon. En mia hejmo venis tri gastoj (Bart, Thomas kaj Maritta (el Flandrio kaj Nederlando), kiuj biciklis de Delft al Emden. Tri tagojn poste venis du junaj viroj el Germanio. Tiuj du (Frédéric kaj Roberto) komencis sian bickladon de Groningen al Parizo. Mi ĝojis kiam mi aŭdis ke ili ĉiuj kvin tranoktas ĉe aliaj membroj de Esperanto Nederland.

Espereble venos pli da homoj! La Internacia Junulara Kongreso ja okazos en Nederlando. Ofte junaj homoj ŝatas bicikli. Ili estas bonvenaj iri al la norda parto de Groningen.

Bosk by Obe - Als bomen kunnen wandelen | Friesland.nl

<https://mallonge.net/225alsbomen>

Scandinavisch Dorp | Eten, Drinken & Overnachten | Paterswoldsemeer

<https://www.scandinavischdorp.nl/>



Bonvenon idealistoj

Het volgende interview is met toestemming overgenomen uit t Poortaal, een gratis vestingkrant voor en door bewoners van de vesting Woudrichem.

Ze dromen over een universele taal voor de hele wereld en ontmoeten elkaar zaterdag 25 juni op een culturele dag in Woerkum. Vestingbewoonster Jorine Captein heeft de dag georganiseerd. Zij is één van de ongeveer driehonderd leden van de vereniging Esperanto Nederland.

Ze weet nog precies wat haar drie jaar geleden deed besluiten de taal te gaan leren. Ze zat in een roeiboot en ter afwisseling telden de roeiers hun slagen in het Engels, Duits, Frans, Maleisisch. En nu in Esperanto, dacht Jorine Captein. Het is de universele taal die haar opa machtig was en haar vader een leven lang fanatiek heeft uitgedragen. Hij gaf les in Esperanto, stelde het huis open voor Esperantisten uit heel Europa, nam zijn gezin mee naar bijeenkomsten en liep als jongeman zelfs met pamfletten naar een congres in Valencia om zijn idealen uit te venten. Het was een soort geloof. Als iedereen de door de Litouwse oogarts Lejzer Zamenhof bedachte taal zou leren, zouden alle volkeren elkaar kunnen verstaan en zou er veel meer wederzijds begrip zijn, zo redeneerden de ouders van Captein. “Het waren echte wereldverbeteraars”, zegt ze en wijst naar hun portretten aan de muur in de huiskamer.

Voor haar keukenraam hangt al jaren de Esperantoster ten teken dat Esperantisten welkom zijn, maar meer als decoratie, want tot voor kort sprak ze de taal niet. De taal en het gedachtengoed was vroeger zó alom aanwezig dat ze er lang niets van moest hebben. Tot in die roeiboot. “Ik ben opgegroeid in Esperanto-soep en ik kon niet eens tot tien tellen...”, zegt ze enigszins beschaamd.



Jorine Captein

Levensstijl

Ze installeerde de app DuoLingo op haar telefoon en begon met het leren van woorden. Daarna volgde ze een cursus, werd ze lid van de vereniging en bezocht ze een bijeenkomst in een Frans kasteeltje waar haar ouders eerder ook kwamen. En nu organiseert ze dus een culturele dag in Woudrichem. De stadswandeling van de VVV heeft ze in het Esperanto vertaald. Ze is trots. Niet op zichzelf, maar postuum op haar ouders. “Ik heb het gevoel dat ik mijn ouders wat meer waardering had moeten geven voor hun levensstijl.” Ze is niet streng in de leer, maar heeft wel meegedaan aan de briefkaartenactie naar het Europees parlement om Esperanto te erkennen als officiële Europese taal. Het zou een volwaardig vak op scholen moeten worden zodat iedereen elkaar kan verstaan. Daar hebben we Engels toch voor, zou je zeggen, maar dat is al de moedertaal van grote groepen mensen. Het gaat erom dat iedereen een tweede taal leert en niemand zich hoeft aan te passen aan een ander, zodat je allemaal op gelijke voet communiceert.

“Esperanto is gemakkelijk te leren hoor”, zegt Captein terwijl ze een folder toeschuift. “En als je het even niet meer weet, zet je er gewoon een ‘o’ achter.”

Bron: Poortaal nr. 34, juni 2022



Revuo-interŝanĝo

Benata Hengstmengel-Koopmans

Revuo-interŝanĝo de Benata Hengstmengel-Koopmans estas projekto por legi pliajn revuojn. Vi povas kontakti min pere de la retadreso benata@zonnet.nl.

Norvega Esperantisto, 3-a periodo 89-a (98-a) jaro, 3/2022, du-monata revuo de Norvega Esperantista Ligo (papere ricevita)

Pri ekskurso en Oslo dum la skandinavia kongreso, kiun gvidis la prezidanto Bård Hekland.

La Kancerkliniko, Politika-Kultura-Skandalema-Ajnista, aprilo/majo/junio 2022, nro 182 (papere ricevita)

Enhavas inter alie “La bubĉaro”, Teatraĵeto en du aktoj De Nicolas Viel, kiu konkursis en la kategorio ‘Teatro’ de la Belartaj Konkursoj de UEA (‘solviĝis per naŭziga rezulto’ kiun oni tamen ne eksplikas al la legantoj...).

La Revuo Orienta, 103a jaro, marto + aprilo + majo 2022, numeroj 1195-1196-1197 (papere ricevita)

En la marta numero sinjoro Hori Jasuo skribas interesan vivorakonton, inter alie pri liaj spertoj dum la tsunami en Fukuŝima antaŭ proksimume 10 jaroj (premiita per la 2a premio en la originala branĉo de Literatura Konkurso de Japana Esperanto Instituto en 2021).

En la aprila numero oni anoncas la 109-an Japanan Esperanto-Kongreson, kiu okazos de la 23-25a de septembro 2022 en Hachioji.

En la maja numero sinjorino Maria Butan el Rumanio skribas en la rubriko “Esperanto kaj Mi” pri ‘Esperanto plenumanta revon’ (temas pri ŝia longe dezirita vizito al Nepalo).

Monato 43-a jarkolekto Junio 2022/06 kaj Julio 2022/07 (www.monato.be)

En la junia numero: Persekutado kontraŭ aktivulo(j) en Egiptio (artikolo de Carlo Minnaja); Kiu estas la plej forta vojaĝdokumento? Laŭ Julius Hauser la pasportoj de Japanio kaj Singapuro estas plej fortaj, tiu de Afganio estas plej malforta); Taliboj fermis knabinajn lernejojn en Afganio. Diplomatoj kritike reagis; Poloj malfermas hejmojn kaj korojn. David Kozub skribas ke Poloj kaj Ukrainanoj estas kiel slavoj kulture kaj lingve similaj; Cho Sung-Ho el Koreio sciigas ke la deka simfonio de Beethoven estas kompletigita; Kees Neeft el Leiderdorp mencias la pardonpeton de Mark Rutte pro la ekstrema perforto en Indonezio dum la sendependiĝa konflikto; Li ankaŭ rakontas ke Lejdeno (mia loĝloko) ĉijare estas la eŭropa ĉefurbo de scienco (ĉar la universitato fondita en

1575 de Willem van Oranje); Jolanta van Holstein recenzas “Lernu- elegante. Ne ege lante! – ŝtupoj al pli vasta vortprovizo”, libron de Petro Desmet (eldonis FEL). En la julia numero: Massino Ripani skribas post restado de 13 jaroj en Rusio “Se fine eblas nur fuĝi”; “Morti pro malsato kaj soifo”. Malsato kaŭzas 45% de la mortoj de infanoj asertas Francesco Franceschini; la usona prezidant-edzino Jill Biden vizitis Slovakion kaj Rumanion por subteni rifuĝantojn el Ukrainio.


Dia Regno, numeroj 2 (953) (mi ricevis 10-5-’22) kaj 3 (954) (alvenis 28-6-’22) - 2022

Sur la frontpaĝo de numero 2: foto de la Katedralo de Sankta Sofia en Kievo kun la demando “Ĉu en danĝero?” Kun klarigo pri tiu ĉi monda heredaĵo de UNESKO el Vikipedio...

En numero 3 de nia membro Gerrit Berveling aperas kaj poemo: ‘Saluton ho oldaj Dioj’ kaj longa artikolo ‘La morto de Peregrino – Lukiano al Kronio: bondezire!’ (kiu estos daŭrigota).

Oud Leiden Nieuws, 10-a jaro, numero 1, marto 2022

Oni priskribas la 100-jaran ekziston de VVV Leiden (la fremdultrafika oficejo). La redaktoro aparte mencias ke Leiden estas skribita kiel Lejdeno en la lingvo Esperanto (en plurlingva broŝuro el 1920).



Ora Ĵurnalo, Magazino por kulturo kaj plezuro, numero 52, junio-julio 2022 (www.esperanto-gbg.org)

Eldonas Esperanto-Societo de Gotenburgo, senpaga monata revuo (la junio-julio revuo estas 45-paĝa)

Artikoloj pri la sveda nacia tago (la 6-an de junio), kiu ekzistas nur ekde 1983; pri tulipaj kampoj de Pollando proksime de Gdansk (‘same kiel en Nederlando’); pri birdoj (‘la plej ŝatata hobbio de la esperantistoj en Gotenburgo estas birdo-observado’); cetere diversaj poemoj kaj rakontoj. Trafis min la rimarko: ‘Esperanto ne estas hobbio, sed vivstilo!!’

Vortserĉenigmo

La temo de la enigmo de ĉi tiu eldono estas **Matematiko**.

Solvo de la antaŭa vortserĉenigmo estas:
"Aro da sentoj rampas tra mia cerbo."

La ĝusta solvo estis sendita de Kees Neeft kaj Jorine Captein.

Ni donas la nederlandajn vortojn. Via tasko estas trovi la ĝustajn Esperantajn vortojn. La neuzataj literoj kune formas frazon.
 Sendu vian solvon al ni. Ni metos la nomojn de tiuj, kiuj solvis la vortserĉenigmon en la venontan numeron.

Frazo:

Kreita de Frank van Hertrooij

V	A	R	E	O	S	E	I	R	B	M	O	N	N	V
O	V	O	L	K	R	I	C	I	A	H	C	E	O	L
L	E	P	O	O	R	O	T	K	A	F	N	I	L	M
U	R	I	N	Ĉ	K	R	E	K	T	O	E	L	U	K
M	A	E	S	I	I	E	O	O	L	O	I	U	G	V
E	Ĝ	K	D	V	A	F	O	T	D	R	C	K	N	A
N	O	A	U	N	S	I	R	I	N	T	S	L	A	D
O	R	T	G	R	R	C	F	O	I	A	U	A	I	R
O	N	U	P	U	B	E	O	M	U	S	V	K	R	A
R	L	P	Z	P	R	O	B	A	B	L	O	K	T	T
O	L	E	U	E	P	A	R	A	L	E	L	A	R	O
L	M	O	N	N	O	K	I	T	A	M	E	T	A	M
A	O	C	N	D	K	S	I	M	E	T	R	I	O	B
V	O	L	E	G	E	T	P	I	T	A	G	O	R	O
O	B	U	K	M	O	K	O	K	I	Z	I	F	O	N

Vortoj:

Cijfer	C _ _ e _ _	Oppervlakte	A _ _ _
Cirkel	C _ _ l _	Punt	P _ _ _ _
Code	Ĉ _ f _ _	Pythagoras	P _ _ _ g _ _
Driehoek	T _ _ n _ _ _	Rechte lijn	R _ _ _ _
Evenwijdig	P _ _ _ e _ _	Rekenen	K _ _ _ u _ _
Factor	F _ _ t _ _	Som	S _ _ _ _
Gemiddelde	A _ _ _ _ ĝ _	Symmetrie	S _ _ e _ _ _
Hoek	A _ g _ _ _	Tellen	N _ _ b _ _
Hoeveelheid	K _ _ _ _ _	Tien	D _ _ _
Kans	P _ _ b _ _ _	Verschil	D _ f _ _ _ _
Kromme	K _ r _ _ _	Vierkant	K _ _ d _ _ _
Kubus	K _ _ _ _	Volume	V _ _ _ _ _ o
Lengte	L _ _ _ _ _	Waarde	V _ _ _ _ _
Loodrecht	O _ t _ _	Wetenschap	S c _ _ _ _ _
Meten	M _ _ _ _ _	Wiskunde	M _ _ _ _ _ a _ _
Natuurkunde	F _ _ i _ _	Wortel	R _ _ i _ _

Foto: Canva

Corine Duivenvoorden-Kors

4 majo 1923 – 3 aŭgusto 2022



Mi ricevis sciigon pri la forpaso de malnova membro de sekcio Haarlem, Corine Duivenvoorden-Kors. Ŝi estis 99-jara kaj jam dum pluraj jaroj loĝis en Driehuis, en maljunulejo (Lodewijk van Deyssellaan 230), sed ŝi estis ankoraŭ tute sana, korpe kaj mense, kaj povis iri kien ŝi volis.

Aparte dankinda estas ŝia voĉlegado el “Fenikso” por Nosobe-anoj. Nur antaŭ duonjaro ŝi malfacile devis rezigni, ĉar la ja aprezata klara voĉo ne plu plenumis ŝian altan kriterion.

Corine Duivenvoorden-Kors estis nia plej aĝa membro. Ŝi aliĝis en 1981 al unu el la Esperanto-asocioj en Nederlando, nun Esperanto Nederland.

Lastfoje mi vidis ŝin antaŭ la komenco de la kronviroza pandemio, kiam ŝi partoprenis kunvenon en la domo de Tanja van Huis. Poste ŝi ankoraŭ telefonis kelkfoje.

Ŝi estis dum pluraj jaroj prezidanto de sekcio Haarlem de Esperanto Nederland. En antaŭaj tempoj ŝi ankaŭ instruis Esperanton. Profesie ŝi estis instruistino en la St. Theresia-lernejo por elementa instruado en Haarlem.

Afable, helpema, interesata, empatia, simpatia: tia ni memeros Corine Duivenvoorden. Ni havas karajn memorojn pri ŝi.

Kun amika saluto, Bert de Wit

Legante en malnovaj revuoj

Verkita de Ralph Schmeits, 3-an de julio 2022

En la numero novembro-decembro 1946 de la revuo Esperanto, redaktita de Hans Jakob, mi legas liston de esperantistoj forpasintaj inter la jaroj 1939 kaj 1946. La numeroj hazarde venis en miaj manoj kiam mi estis helpanta ĉe translokiĝopreparoj en la Centra Oficejo de UEA. Nekredeble tristan similecon inter la tempoj oni povas konstati inter la teruraĵoj kiuj okazas nun en Ukrainio kaj tiuj kiuj okazis en la dua mondmilito.

Inter ili supozeble ankaŭ tiuj homoj kiuj pro natura kaŭzo forpasis, sed ĉe multaj oni raportis militan mortokaŭzon. Ekzemple Pastro Metzger el Aŭstrio, kiun oni ekzekutis “pro lia fideleco al homaranismaj principoj”. Aŭ s-ro Sasonov, “decida ano de la bulgara rezistado”, kiu estis arestita kaj poste mortis pro “manko de flegado en malliberejo”. Ankaŭ kelkaj el Nederlando: s-ro aŭ s-ino W. van Spronsen el Hago kiu lasis la vivon “pro malsato dum vintro 1944-45” aŭ d-ro Van Nooten el Diever kiu mortis nur 40-jaraĝa en Germanio en “brita hospitalo post liberigo”.

En tiuj nur du paĝoj oni ricevas teruran resumon de la kruelaĵoj de tiu milito kaj ne eblas ne tuj pensi pri ĉiuj homoj kiuj nun en Ukrainio kaj aliaj lokoj en la mondo suferas similajn hororaĵojn. El la presitaj mortokaŭzoj: “pereis kun 150 aliaj rezistanoj”, “aviadilo falis en maron”, “devigita labori fizike sen sufiĉa manĝo”, “kelkajn tagojn antaŭ la militofino”, “malaperinta dum la



okupacio germana” kaj ankaŭ kelkaj kiuj estas tiom teruraj ke mi ne volas revortigi ilin ĉi tie. Mi ja ĝojas ke oni tiom malferme raportis pri la mortokaŭzoj, ĉar la dokumento restas tiel grava avertilo ke paco estas delikata afero kiun oni konstante devas prizorgi.

Unu el la forpasintoj estis priskribita kiel “fidela al la principoj de humaneco kaj justeco”. Ankoraŭ hodiaŭ montriĝas kiom grave estas ade labori por tiuj valoroj.

Kun danko al UEA kiu afable disponigis skanaĵojn de la menciita revuo.

Limtranspaŝa konduto

Kio stimulas virojn sen memregado?

Aktuala Modo, ŝajne: malrespekti la inan sekson. Pli verŝajne tamen ĉiama reago al sociaj normoj kiuj protektas sociajn rilatojn kontraŭ primitiva volupto.

Kio do stimulis la militan limtranspaŝon, kies naturmedia efiko nuligas multajn strebojn savi la klimaton? Povas esti ke la varmiĝo efikas al la cerbo: nederlande ni ja parolas pri 'varmegkapuloj'. Sed niaj orientaj despotoj ankaŭ elstaras kiel sportaj herooj: multajn kilometrojn naĝadis kaj Mao Zedong kaj Vladimiro Putin. Tio subtenas popularecon. (Kaj ĉu oni malkvalifikis la rusajn dopulinojn? Kia hontigo!) Tamen en posta fazo kruda subpremado de la libera opiniesprimado garantias la stabilecon formi grandegan regnon unuecan, kie apartiĝo estas netolerebla. La rimedoj, inkluzive venenadojn, estas ja publike piloriataj, sed "Kie regas la potenco, tie rajto silentas". La laŭnoma Rusa Federacio malobservas niajn federalismajn ideojn, nepre ligitajn kun demokrataj, do malrapigidaj, aranĝoj.

Tragedie la Sekureca Konsilio neniam komprenis ke necesas reform-iĝi, dum unu el la Grandaj Kvin povas elreliĝi. Ĝi devus konscii ke NUN venis la momento sin malfermi al tutmonda konsistigo. Ukrainaj esperantistoj povas antaŭvidi ekspluatigon kiel nova rusa kolonio. La tereno estas enorma, certe kun gravaj resursoj, komparebla kun nia kolonio antaŭ-indonezia. Kaj kvankam la homoj ne estis riĉaj, en blindul-kongreso en Irpinj apud Kievo ni havis sufiĉan



manĝon. Tiom pli nin kortuŝis ke mian malsanan edzinon oni aparte regalis per bazare aĉetitaj beroj. Nun helpo certe bonvenas. Nia Ruĝa Kruco malfermis la ĝirkonton 5125. Universala Esperanto-Asocio ekde la Bosnia milito peras monon per la solidarkaso "Espero". Devus profiti, se viva, ankaŭ la sekretario de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj, LIBE, kies deputito mi estas en la Komitato de UEA, kvazaŭ-parlamento. Ŝi diplomiĝis en Meza Ekzameno, kiun estris Nora kaj mi en 1997.

Kaj ŝi transprenis ankaŭ la redaktadon de la Organo de LIBE, "Esperanta Ligilo".

Forton, Olena Poshivana!
Rob Moerbeek.

Preskaŭ-malhoma tasko

Foppe-Klaas Hovinga


Sonĝo: La preskaŭ nevenkebla malamiko ĵus estis superfortita de ni, sed ankoraŭ ne eliminita. Distranĉita sed ankoraŭ vivanta soldatkapo kuŝas sur la tero. Ĝi incitetas min per vortoj kaj provokas min al mia plej profunda memo. Ĝiaj vortoj estas pli fortaj ol mi povas kontraŭi. Mi povas piedbati la kapon, provi silentigi ĝin perforte. Mi havas tiun fizikan potencon. Sed tiam mi kliniĝos al la plej malalta nivelo kaj mi ne volas tion. Kion ajn mi faras, la malamiko, la kapo tie sur la tero, ŝajnas venki.

Semajnon poste, la 20:00 hora NOS-novaĵoj de 7-an de aprilo: bildoj el Ukrainio. Mortintaj soldatoj kuŝas sur la vojo. Aliaj soldatoj faras filmojn kaj ridas. La novaĵprezentisto: "Pafvundita viro en rusa uniformo estis pafita proksime de iu en ukraina uniformo." Sander van

Hoorn en Kievo: "Ili devintus flegigi ĉi tiujn virojn. Tion diras la militleĝo. Ni faris interkonsentojn pri tio. En la momento, kiam al vi ne estas plu minacon tiu, kiun vi kaptis, vi devus trakti tiun homon home kaj tial ankaŭ provizi medicinan prizorgon. Tio klare ne okazis ĉi tie.

La problemo, kiun vi vidas, estas, ke la malamo ambaŭflanke estas grandega, ke la ukrainanoj vidis la videojn de la rusoj dirante, ke ili buĉos ukrainanojn. Kaj ke la malamo estas granda ĉi tie pro tio, tion la rusoj ankaŭ scias. La rusoj, kiuj opinias, ke tio, kion diras ilia prezidanto, ke ili estas fakte malsupera popolo. Tiam vi vidas, ke oni iras al la batalkampo tiamaniere kaj en la momento, kiam vi kaptas iun, ankoraŭ tiun trakti home, kiel la militleĝo preskribas, tio estas preskaŭ-malhoma tasko."

16
LA DIZERTONTO



17
LA DIZERTONTO

Teksto: Boris Vian, trad. George Lagrange

La dizertonto estis protestkanto de Boris Vian kontraŭ la franca politiko en Hindo-Ĉinio en la kvindekaj jaroj. Dum longa tempo la ŝtataj radio-stacioj en Francio ne rajtis elsendi la kanton...

- | | |
|---|--|
| 1. <i>Sinjoro Prezident'</i>
Mi skribas ĉi leteron
Kaj havas mi esperon
Vi legu kun atent' | 7. <i>Dum mia kaptitec'</i>
Jam oni la edzinon
Forŝtelis kaj animon
Kaj la pasinton eĉ |
| 2. <i>Alvenis jen paper'</i>
Kun la ordon-invito
Foriri al milito
Merkrede je vesper' | 8. <i>Jam morgaŭ sen prokrast'</i>
Fermiĝos mia pordo
Al jaroj de la morto
Kaj fuĝos mi kun hast' |
| 3. <i>Mi diras sen rezon',</i>
Ke tion mi ne faros
Mi sur la ter' ne staros
Por murdo de la hom' | 9. <i>En almozpeta viv'</i>
Mi iros tra la mondo
Mi estos vagabondo
Kaj diros re al vi: |
| 4. <i>Ne ofendiĝu vi,</i>
Se mi per ĝi vin spitas,
Mi ĉion mem decidias
Kaj tuj dizertos mi. | 10. <i>"Rifuzu al buĉad'</i>
Rifuzu murdinciton
Ne faru vi militon,
Rifuzu al murdad'! |
| 5. <i>En mia juna aĝ'</i>
Formortis mia patro,
Foriris mia frato
Kaj brulis la vilaĝ' | 11. <i>Se fluu nun la sang'</i>
La propran do vi donos,
Jen kion mi proponos,
Sinjor' de alta rang' |
| 6. <i>Patrino pro sufer'</i>
Jam kuŝas en la tombo,
Ne zorgas ŝi pri bombo
Ne zorgas eĉ pri verm'. | 12. <i>Se vi priserĉos min,</i>
Eksciu trup' ĝendarma,
Ke estos mi senarma:
Ĝi pafu do sen tim'. |



La originala franca kanto:
<https://mallonge.net/vietnamo>

El: Verda Trobadoro. Uitgave FLE. 1986.

ISBN 90-70843-03-X

Bildo de WikiImages (Pixabay)

Tradukitaj libroj de Ladislao Pásztor

S-ino Adrienne Pásztor (pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu)

Pardonu pro la ĝeno, nekonate. Via lando ne estas malkonata al mi, ja mi vizitis ĝin en 1969, kiam mi vizitis tie kelkajn miajn tiamajn korespondantojn dum unu monato, kaj fartis tie neforgeseble bone.

Bedaŭrinde, miaj konatoj jam mortis. Ekde tiam mi ekhavis nur unu kontakton, iaman leganton de nia iama retgazeto nomita Nordhungaria Informo, kiu pro okulmalsano mia kaj miaedza, jam ne funkcias. Nu, mia nova reta amiko helpis la aperojn de la romanoj (tradukoj) kaj alia verko de mia edzo (la lasta estas nia komuna tradukaĵo kaj ankoraŭ ne aperis).

Mi volas alporti la verkojn de mia edzo sub vian atenton, por honordoni al li.

Mi certas, ke la historiajn romanojn ne ŝatas ĉiuj homoj, tamen ĉi tiuj estas interesaj, legindaj danke al sinjoro Rob Moerbeek, kiu faris ilin pere de liaj instrukcioj - senerara. Do, tiel tiuj verkoj estas niaj komunaj. Pro tio, mi ŝatus, se ankaŭ vi, geesperantistoj en Nederlando, ekkonu ilin, sed almenaŭ la legantoj de libroj kiuj interesiĝas pri la hungara literaturo, pri la hungara historio kaj pri la agado de la hungaraj geesperantistoj. Liaj kaj miaj verkoj aperis ĝis nun en la Hungara Elektra Biblioteko, mallonge MEK.

Se vi scivolas pri io, bv. demandi. Mia retadreso estas super la paĝo. *Elkore kaj esprimplene, Adrienne Pásztor el urbo Miskolc, Hungarujo*

Paperajn librojn mi ne havas, ĉar la verkoj aperas nur elektramaniere en nia Landa Biblioteko Széchenyi, kies parto estas tiu ĉi Elektronika Biblioteko (MEK), de kie estas ili estas elŝuteblaj, do ili kostas neniom.

La libro **La homo nevidebla**, verkita de Géza Gárdonyide La unua libra temo estas: la priskribo de la vivo de la huno reĝo Atilo rigardata okule de servisto de la greka scienculo Priskos kaj ĝia servisto, nomita Zeta, la estinta sklavo. Vere ĝi temas ankaŭ pri la batalo de Katalauno, kaj estas amhistorio tra kiu estas ekkonebla la huno vivo. Pri la huno reĝo vi povas legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Atilo_la_Huno

Vi trovas la libron je: <http://mek.oszk.hu/19300/19359/index.phtml>

La libro: **La nigra urbo**, verkita de Kolomano Mikszáth La dua libra temo estas same historia, ĝia agado okazas en la 17-a jc., kiam okazis nia granda fiaska liberecbatalo kontraŭhabsburga estrita de nia princo Francisko Rákóczi la dua. Tamen temas pri nobela sinjoro, kiu estas el Vuóidva, sed la forpasinta edzino postlasis sian filineton. La fortikaĵon havanta nobelo havas strangan naturon, pro kio li kaŭzas damaĝojn, kaj fine pro sia nepripensita ago li mortpafas la urbojuĝiston de la urbo Loče. Nu, la urbanoj volas venĝon ankaŭ tial, ĉar ili volas akiri la terhavejojn de ĉi tiu nobelo. Plej fine ili kaptas lin kaj ili senkapigas lin. Lia filino iĝas orfa ... La historio estas interesa, bela, enhavanta la tiamajn epokajn pensadojn, vivmanierojn de suprahungarlandaj terenoj (sur la tereno la tuta historio agadas inter la saksoj kaj la hungaroj.)


La libro: <https://mek.oszk.hu/22700/22763/>

Ambaŭ librojn mi povas proponi kiel specialajn interesaĵojn.

La libro **Ŝercoj**, tradukita el la hungarlingva kolekto. Oni nun finis la ampleksigitan trian libron de mia edzo (kaj kun li mi): Ĝi estas Ŝerco-kolektaĵo, kiu jam pretas. Jen: <https://mek.oszk.hu/15100/15160/>

La kvara verko de mia edzo, ties titolo estas **Mi trapasas "Király-hágó"-n, pordegon de Transilvanio** kaj estas verkita de Imre Farkas. Ĝi aperis ĉe MAS kaj aĉetebla estas ĉe UEA kiel papera eldonaĵo (6.60 €). Ĝi temas pri sikul-hungara knabeto kiu de teritorio de la nuna Rumanio (disligita de teritorio de Hungarujo en 1920) fuĝas unue al Hungarujo, kie hazarde li konatiĝas kun senatano, kaj kun ties familio iros al Ameriko, kaj vizitas ankaŭ landon de Papuoj. Poste li reiras sian landon, kiam oni ĝin en 1938 redonas al la hungaroj. la infanromano estas ĉarma, agadoriĉa, interesa.

De la redaktoroj: Rob Moerbeek ĵus kontrolis la kvinan verkon, kiun Ladislao Pásztor tradukis. Ĝi estas la romano "La filoj de l' ŝtonkora homo" de Mór Jókai. Pri ĉi tiu libro vi povas legi en iu venanto numero de Fenikso.



Gloro al la am'

Hic, hac, hec, pac' kaj fratec'!
(Iru, hundo!)
Vin, ven, van, ni amas unu l' alian!
(Ĉu mordi?)
Homoj el' tuta mondo
Nun ni kreu rondo'
Amikoj por ĉiam
Gloro al la am'

Foppe-Klaas Hovinga

Loze tradukita el:

"Lenie uit de Takkestraat" de

Tineke Schouten

Respondoj de la

Lingva testeto

Jen la respondoj de la lingva testeto de paĝo 7.

Respondo de demando 1: c

Mucida signifas: malbonodora pro ŝimo, humido, manko de freŝa aero, ktp. (nederlande: *muf, bedompt*). Ekzemple, malnova pano iĝas mucida. Ankaŭ vestoj kiujn oni longe lasis en la ŝranko ofte odoras mucide.

Respondo de demando 2: b


En multaj landoj oni pridiskutas, kiun pronomon uzi por almontri personon kiu identiĝas nek kiel viro nek kiel virino. En la nederlanda lingvo ĝis nun ne aperis kontentiga solvo, sed en Esperanto la nove proponita pronomo *ri* jam iĝis sufiĉe kutima por ĉi tiu celo. Ekzemple: *Konata nederlanda verkisto estas neduuma* (non-binair). *Hieraŭ ri aperis en televida diskutprogramo kaj parolis pri la manko de taŭga pronomo en nia lingvo.* Luj uzas *ri* ankaŭ en pli ĝenerala senco kiam temas egale pri viro aŭ virino, ekzemple: *Neniu scias kion ri travivos morgaŭ.* Tamen en tiaj kazoj *li* estas pli kutima. Aŭ eventuale: *Neniu scias kion li aŭ ŝi travivos morgaŭ.*

Arjen-Sjoerd de Vries

Oproep voor bijdragen

Elk lid van Esperanto Nederland houdt zich op zijn of haar eigen manier bezig met Esperanto, variërend van het bestuderen van de grammatica, het schrijven van gedichten of andere teksten, tot het ontmoeten van andere esperantisten, fysiek of op sociale media. We roepen je op om je ervaringen met ons te delen. Je verhalen zijn meer dan welkom, zowel in het Esperanto als in het Nederlands. Stuur ook foto's mee. Grammaticale fouten corrigeren we. Inkorten en andere aanpassingen doen we zoveel mogelijk in overleg. Wanneer je wilt, kunnen we ook een interview houden. Neem bij langere teksten eerst even contact met ons op.

Stuur je bijdrage op naar: redakcio@esperanto-nederland.nl.



Ekzistas diversaj radio-stacioj, kiuj elsendas en Esperanto

3ZZZ Radio

Ĉina Radio Internacia

Radio Frei

Kernpunkto

Muzaiko

Radio Havana Kubo

Varsovia Vento

Radio Vatikana

Diversmaniere vi povas aŭskulti elsendojn, ekzemple:

- aŭskulti rete: <http://esperanto-radio.com>

- aŭskulti per apo (nur Android): [Muzaiko](#)



Esperanto-radio

Muzaiko



14 - 16 oktober 2022 Esperanto Studieweekend

La Esperantan tradukon de ĉi tiu teksto vi trovas sur paĝo 8.

Welkom

De voorbereidingen voor het studieweekend op 14 t/m 16 oktober 2022 zijn in volle gang. Er zijn ook al de nodige aanmeldingen binnengekomen, dus als je verzekerd wilt zijn van deelname, wacht dan vooral niet te lang met je aan te melden!

Onze trouwe deelnemers weten al hoe het programma van het studieweekend eruit ziet. Vrijdagavond komen we aan en is er tijd om bij te praten en kennis te maken. Op zaterdag begint het echte werk in de vorm van een intensief programma van in totaal vijf lessen, van 's ochtends tot in de avond. 's Avonds is er gelegenheid voor ontspanning en gezelligheid, en misschien is er nog een muziekprogramma. Zondag gaan de lessen verder, maar er is ook tijd om te genieten van de mooie natuur van deze regio. Het programma is om een uur of drie 's middags afgelopen.

Er wordt op vier niveaus les gegeven. Bij de aanmelding geef je je niveau op: absolute beginner, bezig met een beginnerscursus, beginnerscursus net afgerond, gevorderde. Het onderwijs wordt verzorgd door kundige Esperanto-docenten uit verschillende landen, dus je zult zeker een hoop opsteken!

Als cursusgebouw hebben we weer het natuurvriendenhuis Krikkenhaar afgehuurd, in de buurt



van Almelo. Dat is ons de laatste paar keer prima bevallen: een mooie omgeving, voldoende slaappleatsen, grote gemeenschaps- en lesruimtes, een goed uitgeruste keuken. Tijdens het hele weekend staat de keukenploeg voor ons klaar. Zij zijn maar met zijn tweeën, dus er is wel wat hulp van de deelnemers nodig bij het tafeldekken en opruimen.

We hopen we jullie in groten getale in Krikkenhaar te kunnen verwelkomen!

Voor wie Als je nog nooit Esperanto hebt geleerd, of je Esperanto is nog niet zo goed als je zou willen, ben je van harte welkom. Er wordt op verschillende niveaus les gegeven. De nadruk ligt op het oefenen van het spreken in Esperanto in kleine groepen.

Wanneer Het studieweekend vindt plaats op vrijdag 14 t/m zondag 16 oktober 2022.

Waar Natuurvriendenhuis Krikkenhaar, Krikkenhaar 11, 7627 PA Bornebroek.

De kosten voor dit studieweekend bedragen € 85,- p.p. (leden van Esperanto Nederland en NEJ of andere landelijke Esperanto-verenigingen betalen € 75,- p.p.) In de prijs zijn inbegrepen: lessen, het overige programma, overnachtingen, maaltijden, koffie en thee tussen de lessen door.

Meer informatie en het aanmeldingsformulier staan op de website van Esperanto Nederland: <https://esperanto-nederland.nl/studieweekend>

Ineke, Lilian, Arjen-Sjoerd

septembro - oktobro 2022
27a ĵarkolekto, n-r 5

Fenikso

PostNL
Port betaald
Port payé
Pays-Bas